

N. N. 31,

Dum fluas klaraj fontoj

tradukita de Joachim Gießner

1. Dum fluas klaraj fontoj,
 Freŝiĝi volas ni.
 Knabinon mi ne voku,
 Per manoj gestas mi.
 Knabinon mi ne voku,
 Mi ne voku,
 Per manoj gestas mi.

2. Per frapo de piedo
 Alfluas mia am'.
 Jen inter la knabinoj
 La mia estas jam.
 Jen inter la knabinoj
 Knabinoj
 La mia estas jam.

3. Kaj ĉu mi ŝin ne amu?
 Ĉar estas ŝi anĝel'.
 Okuloj respegulas
 Bluaĵon de l'ĉiel'.
 Okuloj respegulas
 Respegulas
 Bluaĵon de l'ĉiel'.

...

N. N. 31,

Wenn alle Brunnlein fließen

1. Wenn alle Brunnlein fließen,
 So muß man trinken
 Wenn ich mein'n Schatz nicht rufen darf,
 Tu ich ihm winken,
 Wenn ich mein'n Schatz nicht rufen darf,
 Ju, ja, rufen darf,
 Tu ich ihm winken.

2. Ja, winken mit den Äugelein,
 Und treten auf den Fuß;
 's ist eine in der Stube drin,
 Die meine werden muß,
 's ist eine in der Stube drin,
 Ju, ja, Stube drin,
 Die meine werden muß,

3. Warum sollt sie's nicht werden,
 Ich hab' sie ja so gern;
 Sie hat zwei blaue Äugelein,
 Die leuchten wie zwei Stern,
 Sie hat zwei blaue Äugelein,
 Ju, ja, Äugelein,
 Die leuchten wie zwei Stern.

...

4. La vangoj estas ruĝaj
 Samkiel ruĝa vin'.
 Pli ĉarma ne troviĝas
 Ol tiu belknabin'.
 Pli ĉarma ne troviĝas
 Ne troviĝas
 Ol tiu belknabin'.

4. Sie hat zwei rote Wänglein,
 Sind röter als der Wein;
 Ein solches Mädcl findst du nicht
 Wohl unterm Sonnenschein;
 Ein solches Mädcl findst du nicht,
 Ju, ja, findst du nicht,
 Wohl unterm Sonnenschein.

*Traduko de la Germana poemo "Wenn alle Brunnlein fließen" de N. N. 31 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-617-1240 (2012-10-17 21:59:49)

Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>, pli precize sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 31.

Arg-617-1239 (2012-10-17 21:48:23)

La teksto troviĝas en <http://ingeb.org/Lieder/wennalle.html>. Tie estas aŭdebla ankaŭ la melodio.